

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Vi aŭdas la sesan prelegon pri tiu temo.

La libro *Rememoro de Solferino* ne nur celas vekti emocion de la legantoj. Ĝi volas instigi ilin al eklaboro. Kaj ĝi plene sukcesis.

La alvoko de Dunant profitis pri favora klimato. La civitanoj de la urbo Ĝenevo estis maturaj por entrepreni gravan filantropan taskon. Ni menciuj, ke je la anonco de la itala milita kampanjo en la salonoj de Ĝenevo oni sentis la bezonon krei komitaton por organizi sanitaran helpon por la vunditoj. Henry Dunant, kiu ĉeestis tiujn diskutojn, kontraŭstaris tiun proponon asertante, ke bandaĝojn oni rajtas pretigi nur kiam ekzistas vunditoj. Unu monaton poste la hazardo kondukis nian oponanton al la ĉefa batalejo de tiu itala milito. Henry Dunant deziris kontakti la imperiestron Napoleono la tria por peti subvencion koncerne la konstruadon de muelejoj en Alĝerio.

*Rememoro de Solferino* provas prezenti internacian konflikton laŭ neŭtrala vidpunkto. Nur tiurilate ĝi jam estas gravega dokumento, kiu malfermas novan tendencon en la priskribo de historiaĵoj. Pri la senpartio de Henry Dunant oni tro facile silentas, kvankam ĝi klarigas grandparte la sukceson de la libro.

En *Solferino* Henry Dunant malkovris, ke milita dekoro kaŝas malgloran flankon. Dum dekkvin horoj li observadis centmilojn da homoj interbataladi. Kaj je la vespero de la 24-a de junio, kiam la kanonoj eksilentis, nia ĝeneva komercisto promenante en halucina mondo sentis sin respondeca pri la sorto de la viktimoj, kiuj kuŝis je liaj piedoj. En ruinigita vitejo vunditoj per lasta strebo vokas helpon, kiu ne venos pro manko de sanitara organizo. Mi legos venontan semajnon tekston de Henry Dunant koncerne tiun vesperon. Hodiaŭ mi nur citu lian konkludon : « *Ekster ĉia milita kaj glorama vidpunkto tiu batalo Solferino restas, je vidpunkto de ĉiu neŭtrala kaj senpartia observanto, nura eŭropa katastrofo.* » (Fino de la citaĵo).

Oni multe parolas pri la libro *Rememoro de Solferino*, sed fakte oni ĝin malofte legas. Jam de longe ĝi restas elĉerpita. Ĝian legon profesoroj ne konsilas al siaj studentoj. Lernolibroj apenaŭ mencias okaze de la batalo Solferino, ke ĝin travivis neŭtrala observanto, kiu poste alvokis la homojn rezigni je la uzo de perforto por la solvo de la internaciaj konfliktoj, kaj kiu, kun realismo, proponis fondon de sanitara organizaĵo por la sekuro de la viktimoj de armitaj luktoj. La alvoko de Henry Dunant estas tiel universala, tiel aktuala, tiel celtrafa, ke oni evitas ĝin diskonigi en la junularon. Ĝi diferencas tro de la kutimaj verkoj de niaj naciaj historiistoj kaj literaturemuloj. Ĝi estas la krio de humanisto, aŭ pli precize de homarano.

Henry Dunant nin rememorigas, ke en batalo estas venkanto, nur se samtempe estas venkito. Laŭ li ambaŭ batalintoj estis heroe kuraĝaj, nur hazardo decidis pri ilia sorto. Li montras, ke post batalo la servokapablaj soldatoj rapide forlasas la luktejon. Dum en pompaj ceremonioj svarmo akklamas heroojn, oni forgesas, ke aliaj herooj atendas en preĝejoj aŭ amaskuŝejoj sengloran morton aŭ mizeran kriplan resaniĝon. En Parizo dum la festo de la venko Solferino oni ne nur forgesis mencii la nombron de la mortintoj kaj vunditoj, sed ilian proporcion kompare kun la tuta soldataro. Oni ekzemple ne diris, ke po unu soldato por tri falis sur la batakampo. La historiistoj en siaj batalpriskriboj plej ofte forgesas la homan aspekton. Ili parolas pri taktiko, ĉi tie de la imperiestroj Napoleono la tria kaj Franc-Jozefo kaj de la reĝo Viktor-Emanuelo. Kiel en filmoj, iliaj verkoj donas ofte la impreson, ke la perdoj preskaŭ nur okazas ĉe la malamika flanko kaj la heroismo regas nur ĉe la alia. Malfermu viajn lernolibrojn kaj vortarojn. Serĉu Solferinon, unu el la plej mortigaj bataloj de la pasinta jarcento. Ĉu vi trovos mencion pri la nombro de falintaj soldatoj ĉe la diversaj

armeoj ? Mi forte timas, ke via serĉado tiurilate restos vana. Kaj se vi hazarde prenas libron verkitan de alia naciانو, la priskribo de la kampanjo forte aliĝos.

Edmond Privat diras en sia verko *Interpopola Konduto* : « *En lernejoj vi lernas Nacian Historion. Fakte ĝi ne povas esti. Nur historio de la nacio povas ekzisti. Tute alia afero ĝi estas. Kion oni instruas, tio estas nur historio vidata de la nacio. Se oni ĝin instruadus vidatan de la ceteraj, tiam ĝi riskus estis ĉie sama, tio estas, iom pli vera. En multaj lernejoj historio ankoraŭ ne estas scienco. Ĝi estas nura literaturaĵo. Tiu literaturaĵo estas ĉefe primilita. En ĝi la bataloj okupas la plej gravan lokon. Tion kune konstatis francaj kaj germanaj edukistoj, kunvenintaj en kongreso post la unua mondmilito. Ilin oni hontigis. Oni timis, ke ili volas senigi la historion je lipharoj kaj muziko. Verdire nur tion ili postulis, ke ankaŭ la nombro de mortintoj estu menciata.* » (Fino de la citaĵo).

Delegitoj de Unesko post la dua mondmilito konstatis la samon. Bedaŭrinde la instruado pri historio ne multe ŝanĝiĝis. Se antaŭ unu jarcento la libro de Henry Dunant renkontis grandan sukceson, ne estas pro ĝia filantropa alvoko, sed ĉar ĝi prezentis kun senpartiemo konflikton aktualegan ĝis tiam nur tendence priskribitan.

Tiu konflikto ne plu estas aktuala. Sed la problemo de la uzo de armiloj tamen daŭre ekzistas. Ĝi konservas al la verko *Rememoro de Solferino* plenan aktualecon.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Se vi deziras aŭdi la sekvontajn prelegojn pri tiu ĉi temo, ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-